

# HERALDO



## de esperanto

### MONATA INFORMILO DE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Numero 7 (2298), 95<sup>a</sup> jarkolekto

Esperanto-Domo, Postiers 27, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) - telefono (41)32 9267407 - kce@esperantio.net - pĉk 23-2921-8

julio 2019


## Dufronta batalo

La turmenta intertraktado pri la brita secesio instruis ke, el la tri ĉefaj instancoj de Eŭropa Unio (Komisiono, Parlamento, Konsilio), ĝuste la asembleo de la membroŝtataj gvidantoj plej gravas. Tion konfirmas la fakto ke la germana kancelierino kaj la franca prezidento komencis diskuti pri la estontaj EU-postenuloj tuj post la baloto de la 26<sup>a</sup> de majo, anstataŭ lasi tiun taskon al la parlamentaj grupestroj, kiel normale en reprezenta demokratio.

Tamen estus eraro pensi ke tiu baloto neniom influas la estontecon, same kiel estus eraro taksigi ĝin influa kiel en vere federisma sistemo (ekzemple la svisa). La verdikto de la urnoj fakte havas du gravajn signifojn, politikan kaj financon.

Elektante tiom multe da "suverenistoj" (ne nur britaj, sed ankaŭ la francaj de Marine Le Pen kaj la italaj de Matteo Salvini), la eŭropanoj donis al tiuj partioj amason da rimedoj: enormaj salajroj por la deputitoj, bonegaj salajroj por iliaj stabanoj, senpaga infrastrukturo (kie bonŝance ne eblas labori semajnfine), financaj rimedoj. Unusola EU-deputito povus vivteni tutan partieton, en mediteranea lando: imagu tiom da deputitoj por la opozicio kontraŭ EU!

La nuna antieŭropismo rilatas al EU simile kiel la svedaj socialistoj al la burĝaro en la 1930<sup>aj</sup>: ne necesas detruigi la (politikan aŭ klan) malamikon, sufiĉas ekspluati ĝin. Laŭ tiu logiko, Le Pen kaj Salvini estas la unuaj kiuj ĝojas ke ili gajnis, sed ne supervenkis: aliaj gratu sin per la zorgoj de eŭropa administrado, dum ili fortigas siajn partiojn, por la sekva klopodo konkeri la povon en la respektivaj landoj (aŭ firmigi ĝin, en Hungario).



Politike gravas, ke la uniemaj fortoj tamen ankoraŭ venkis, des pli ke la majoritato nun dependos ne nur de socialistoj kaj kristandemokratoj, sed grandparte ankaŭ de verduloj kaj liberaldemokratoj. Ĉi tiu parlamenta majoritato ricevis tamen la lastan ŝancon: ĝi plej responsas pri la strebo evoluigi la tutan strukturon al aŭtenta federismo. La batalo estos dufronta ĉar paradokse la nuntempa EU, regata de la Konsilio, estas pli proksima al la perspektivo de la suverenistoj ol al tiu de efika integriĝo.

Giorgio Silfer

## Burĝonis melodia floro en esperanto



Federica D'Antonino

Federica D'Antonino soprano, Gaetano Merone baritono kaj Francesco Cipullo pianisto realigis la unuan KDon kun napolaj kanzonoj en Eo. La premiero estas programita dum IJK en Slovakio.

La diskon *Kanti klasike* produktis LF-koop, registrita en Svislando. Ĝi kronas riĉan sezonon de italaj kantistinoj: Chiara Raggi el Rimino (kantaŭtorino), Maria Grazia Barboni el Ankono (femina interpreto de Fabrizio De André) kaj nun Federica D'Antonino, kun operaj, operetaj, napolaj melodioj.

## Kioma kapitalo?

Laŭ la financa bilanco 2016 la tuta malneta posedaĵo de Universala E-Asocio estis iom malpli ol ses milionoj da eŭroj. La kreditoroj estis 2,4 milionoj, do la neta posedaĵo estis pli-malpli 3,6 milionoj. Tio ne ŝajnas malbona, tamen se ni analizas la detalojn, tiam ni povas konkludi, ke la financa situacio de nia organizo estas malstabila.

La kialoj estas diversaj, unue menciindas, ke granda parto de tiu mono ne uzeblas libere (ekzemple por kovri la kostojn de funkciado de nia asocio), sed ili estas uzablaj por difinitaj celoj. (Ekzemple el la Afrika Fondaĵo oni rajtas nur evoluigi la afrikan movadon, ktp.).

En la bilanco la ĝenerala kapitalo estas preskaŭ 1.800.000 eŭroj, kaj ankaŭ tiu kapitalo estas nur parte uzebla libere kaj rekte. Ĉar ene de tiu sumo estas la valoro de la domoj, postuloj, la stoko de la libroservo kaj similaj. Se oni subtrahas tiajn valorojn restas nur **ĉ. 660.000 eŭroj**, kiuj estas rekte kaj libere uzeblaj.

Nia buĝeto nun enhavas deficiton de ĉ. 150 mil eŭroj, kaj similaj deficitaj okazos ankaŭ en la venontaj jaroj, tiam estos risko, ke **UEA bankrotos post kvar aŭ kvin jaroj**. UEA havas grandan parton de sia mono en valorpapiroj, do estas ankaŭ risko, ke la valoro de tiuj paperoj malaltiĝos, se okazos neantaŭvidebla krizo en la borsa merkato.

Menciindas, ke la asocion savis du membroj en la pasintaj jaroj. En 1999 fluis al la kapitalo heredaĵo de ĉirkaŭ 900.000 eŭroj kaj en 2010 temis pri ĉirkaŭ 450.000 eŭroj. Sen tiu mono la asocio jam delonge estus bankrota. De 2011 la kapitalo restis stabila aŭ iomete kreskis, kvankam fluis konstantaj subvencioj al la spezokonto. Tio okazis danke al unu de la plej longdaŭraj kreskoj ĉe la borso sed neniu scias, kio okazos en la borso post du, tri aŭ kvar jaroj.

(El la konfidenca raporto de la **financa laborgrupo de UEA, 2018**)

**Dum UEA investas en valorpapiroj, la konsorcio de la Esperanta Civito preferas aĉeti nemoveblaĵojn, kies luigo kaŭzas pli sekuran enspezadon. Krome viaj donacoj estas uzataj ne por kovri la deficiton kaŭzitan de nederlandaj salajroj, sed por subteni kulturalan produktadon. Kaj ne restas deficit.**

**Pro Esperanto: La domo en Andaluzio, pro konstanta luigo de la Mevonesto, komencas esti modere rentodona. Tio iomete vigligas la stagnantan kapitalon. KCE: La sola luigo de la plej malgranda apartamento jam sufiĉas por kovri la hipotekan prunton. Mankas rezervo, sed la spezado estas plene sub kontrolo. Estus oportuna pli da partopreno en la didaktika aktiveco.**

**LF-koop: Akumuligis elspezojn pro intensigo de la produktado, kiujn ne sekvas same rapida enspezo pro la vendoj. Aliflanke la prestiĝo de LF-koop kreskas ĝuste pro tiuj produktoj.**

**PEN: Jam finance stabila, la stablo ricevis fortan rabaton en la pago de la kotizoj al Londono, ĉar la internacia kasisto estis persvadita pri la diasporo de la esperantaj membroj, ne kalkuleblaj kiel svisoj malgraŭ la oficiala adreso.**

## Vizito en OIK memore pri Károly Fajsz



Károly Fajsz (1911-2004) estis hungara poŝt oficisto, kiu esperantiĝis okaze de la Budapeŝta Universala Kongreso en 1966. Post sia emeritiĝo en la 1970<sup>aj</sup> li komencis kolekti E-librojn, gazetojn, revuojn, insignojn, standardojn k.a. Tiutempe troviĝis ankaŭ Epakumoj por alumetoj, ĉokolado, cigaredoj. Li havigis al si ankaŭ la skribotablon de Kalocsay. Ĉio tia kaptis lian intereson.

Lia triĉambra loĝejo en budapeŝta etaĝdomo, konstruita en la fino de la 19<sup>a</sup> jarcento, ekpleniĝadis de ĉio esperanta. La libroj kaj aliaj aĵoj engrimpis ĝis la plafonoj. Lia edzino permesis tion, eĉ fariĝis helpanto en la kolektado. Post kelkaj jaroj jam estis bezonataj du pliaj helpantoj por la katalogado.

La unua parto de la katalogo, 542 paĝoj, aperis en 1991. Ankaŭ la dua parto estas aperinta, sed la precizan jaron mi ne scias.

En la 1990<sup>aj</sup> la ekonomia situacio en Hungario ŝanĝiĝis kaj ne plu estis facile kolekti E-aĵojn. S-ro Fajsz petis eksterlandajn E-istojn kunporti aŭ sendi aldonajn aĵojn al lia kolektaĵo, li volis kompletigi, perfektigi.

Mi vizitis la hejmon de ges-roj Fajsz, kiam mi bezonis E-tradu-

### AGENDO 2019 EN KCE

**Aprilo 12-15**

- Lingva kolokvo pri *Aliroj al Eo*  
- Celebrado de la ora jubileo de KCE  
- Asembleoj de KCE kaj de LF-koop

**Julio 8-14**

*Ekperimenta kurso pri tradukarto*  
gvidas Perla Martinelli

**Julio 15-21**

*Ateliero pri beletra verkado* (prozo)  
gvidas Giorgio Silfer

Asembleo de Feminisma E-Movado

**Aŭgusto 14-21**

*Esperantologia Fakultato*

lekcias Perla Martinelli,

Cesco Reale, Giorgio Silfer

**Oktobero 31 - Novembro 3**

*Homarana forumo*

kun eminentaj zamenhofologoj

**Somere kaj paralele: B-kursoj**

## Nia lingvo 132-jara

La pasintjara mesaĝo de la Konsulo okaze de la Tago de la Esperanta Lingvo restas absolute aktuala. Indas aldoni ke la Civitaj institucioj kaj servoj rilate la lingvon fartas pli bone, interalie pro la lingvotesta aktiveco de KCE, ne menciita en 2018. Kaj eblis bonvenigi c-anon Vinko Oslak en la dekdoupon de la Lingva Komitato.

Bedaŭrindas konfirmi la velkadon de aliaj Akademioj, ekster la Esperanta Civito. Evidente ne estas afero nur de homoj: Akademio Literatura de Eo (kvarono de mortintoj en nur 80% plena listo) vegetas malgraŭ la sekretarieco de c-ano Tomasz Chmielik, ĵus elektita kiel prezidanto de la modere prosperanta Esperanta PEN.

Inter despero kaj prospero de unuopaj lingvaj stabloj, kiel fartas la lingvo de la kolektivo, tutan jaron poste? En granda stabileco, kvante kaj kvalite. Invida novaĵo povus esti la kreskanta uzo de **Ri** kiel pronomo de tria persono, por eviti la distingon inter la seksoj en laŭmoda transgenro. Uranistoj kaj hermafroditoj ekzistis jam en la epoko de Zamenhof, kaj la Majstro mem implicite indikis solvon por ili, en siaj *Lingvaj Respondoj* 90 kaj 91.

Neniu rimarkigis ke la manko de distingo inter la seksoj havas tute alian originon, ol havas la distingo mem. Se la esperanta skemo paŭzas la anglan, tio klariĝas per la distingo de la tri variantoj en la hind-eŭropaj lingvoj. Sed apliki tiun distingon ne nepre kondukas al seksismo.

Por la antikvaj romanoj la unuan lokon en la hierarkio okupis la liberuloj, sendepende de la sekso; tial, se *Mulieres tres et vir unus capti sunt* (maskle, tri virinoj kaj unu viro estis kaptitaj), *Mulier una et mancipia tria capti sunt* (female, unu virino kaj tri sklavoj estis kaptitaj, ĉar sklavoj valoras malpli ol libera virino, eĉ se viro – ĉi tie neŭtra substantivo).

Por la finn-ugraj lingvoj la unuan lokon en la hierarkio okupas ne la animaloj, sed la animuloj: homoj havas animon, do meritas apartan pronomon, sen distingo de sekso. Kio per si mem ne signifas, ke la kondiĉo de la virino en la hungara, estona aŭ finna socio estas pli alta ol en alia...

La adopto de nova pronomo ne signifus ŝanĝon en la E-lingva komunumo, speciale en ĝiaj lingvaj institucioj. Krome, laŭ konfeso de lesbaninoj, rilate al masklismo ne ĉio glatas eĉ en la GLAT-mondo...

Ekzistas ĉarlatanoj kiuj kuracas nur la simptomon sed preteratentas la malsanon. La propono pri "Ri" memorigas tiajn medicinistojn.

Giorgio Silfer

1

## Interlingvistiko



La “kreskanta produkta platformo” de la Civita konsorcio realigis plian servon. Kunlabore kun la privata lernejo LEST, Itala Interlingvistika Centro organizis la 1<sup>an</sup> Interlingvikan Seminarion, sub la gvido de prof. Giorgio Silfer kaj la asisto de d-ino Lorena Bellotti.

La unuta seminario (25 maj 19) arigis dekon da personoj, grandparte itallingvaj instruistoj. *Un seminario veramente interessante!* diris Mariarosana Zanolli, profesoro pri historio kaj filozofio en loka liceo, fine de la aranĝo. Al ŝi eĥis Nancy Lembrechts, instruistino pri nederlanda, angla kaj itala lingvoj: *E' stata una bella giornata, era molto interessante. Grazie ancora.*

Duone sukcesa el kvanta vidpunkto, la seminario estis kvalite altnivela: *C-ano Silfer kapablas doni tre riĉan panoramon, enmetante tre valorajn glosojn kaj detalojn, aldone al ĝenerala fadeno kiu ni neniam maltrafas, komentariis c-ino Bellotti. Alia partopreninto emfazis, ke ni atingis la lunĉotempon sen minimuma laciĝo post tri tamen intensaj horoj.*

Laŭ la seminariestro, pli modeste, granda merito apartenas al planlingvistiko mem, kies enhavo kapablas ĉiam fascini la novulojn.

## La sekreta vilaĝeto

Ni iniciatis novan filmoprojekton, kies historio okazos en la svisaj Alpoj. Temas pri juna vojaĝanto, kiu serĉas sekretan vilaĝon.

Neniu scias, kie situas la vilaĝeto Salvejo. Tre malnova E-gazetartikolo parolas pri ĝi, sed nenio en la teksto specifigas, kie ĝi situas en Svislando. Ĉu nia juna esploristo trovos tiun “fantoman vilaĝon”, kiu ne aperas surmape? Ĉu li povos renkonti tiujn montajn kamparanojn, kiuj ĉiuj lernis Eon en la 1950<sup>aj</sup>?

La filmo estos parolata en Eo kaj subtekstigita en la franca. Ni serĉas la senpagan kunlaboron de aktoroj aŭ/kaj teknikistoj. La filmado okazos 14-16 sep 19 en Valezo.

**Laŭzana E-Societo**

## Tri kulturcentroj

Kvankam oni pensas pri ili kiel similaj E-domoj, Greziljono, La Kvinpetalo kaj KCE malsamas kaj jure kaj cele.

La kastelono posedas kooperativon, la domojn en Bureso proprietasocieto laŭ la franca leĝo de 1901, KCE estas societo sen profita celo.

Laŭ sia statuto, Greziljono celas flegi infrastrukturon kaj provizi ĝin al la E-istaro: la kultura programo estus duaranga, kaj dependus precipe de aliaj societoj. Tial ĝi estas pli komparebla al Gastejo Edmond Privat ol al KCE.

Societo Yvonne Martinot naskiĝis kiel franca filio de LF-koop, kies iniciatojn en Francio ĝi prizorgu; tial ĝi okupiĝis pri la tri E-rendevuoj, la formado de kadroj, la distribuo de varoj ktp. Ĉio ĉesis per la disiĝo el LF-koop, kaj SYM aktivis nur en sia vilaĝeto, kie la domflegado iĝis nun prioritata.

KCE estas lernejo, konferencejo kaj ekzamena centro. La domo ne rolas prioritare, estas ne celo, sed rimedo por financi la societon: por la aliaj praktike estas inverse. Aldone, KCE situas en transnaciaj cirkvitoj (ALTE, la Esperanta Civito), dum la aliaj strikte dependas de la franca medio.

La politika movado Eŭropo-Demokratio-Esperanto partoprenis en Francio per propraj kandidatlistoj en la baloto por la EU-Parlamento, 26 maj 19. Tio okazis jam la kvaran fojon, sed en la antaŭaj ĝi arigis preskaŭ 0,2% de la francaj voĉoj, dum ĉi-foje ĝi ne atingis eĉ 0,1%. Ĉu alvenis la fino de tiu eksperimento, kontraŭ kiu anatomis la franca sekcio de UEA en septembro 2003, sub la prezido de s-ro Longuepée (kromnomita “la ruĝa kapitalisto”)? Multe pli sukcesa la eta paneŭropisma partio Volt, kiu tamen havis kandidatojn en ĉiu EU-lando kaj elektis propran deputiton en Germanio, unufoje.

## Literatura Foiro 299

La juna numero de *Literatura Foiro* akurate atingas la abonantaron, kun tre bela kovrilo anoncanta la ĉefartikolon, kiun Alexandre Mendas Correa dediĉis al Ze'egete (“la vera lingvo”), parolata en Brazilo, okaze de la internacia jaro de la indiĝenaj lingvoj.

Sur la esea kampo elstaras ankaŭ la artikolo de Davide Astori pri Leonardo, mondĉivitano aŭguranta Eŭropon; la kontribuo de Francisko Degoul pri *La sankteco de Zamenhof*, laŭ peto de Internacia Junulara Festivalo; la tria esploraĵo de Giorgio Silfer pri la filozofio de Zamenhof: *Framasona templo por la unua homarano?*

Poezio printempe ŝosas per uverturo de Dimitrije Janičič, interludo de Tiberio Madonna, lirika traduko el Cardarelli fare de



Biagio Trapani. Prozo buntas per humuraĵo de Giuseppe Campolo: *Marso*; per rakonto de Julian Modest *La mantelo*; kaj per mirindaj kontribuoj – el Popola Ĉinio (*Ruĝa sorgo, kvina ĉapitro* de Mo Yan, tradukis Vejdo), el Serbio (*La fantomoj de mia patrino* de Vasa

Transkulise

## Solena inaŭguro

Dimanĉon, la 29<sup>an</sup> de julio 2018, okazis la t.n. Solena Inaŭguro en la granda amfiteatro de Coliseu dos Recreios en Lisbono.

Iu pranepino de Zamenhof voĉlegis paroladeton, sufiĉe flue kaj belprononce. Nur malofte ŝi stumletis (ekz. *umuj la ajliaj*), sed kiam ŝi devis voĉlegi la naskiĝjaron de sia praavo (1859), kia katastrofo! Oni bone dresis ŝin antaŭe, sed la datojn oni forgesis skribi plentlertre, anstataŭ nur cifere. Nur tre pene, hezite, balbute kaj stakate ŝi sukcesis elbuŝigi la daton, sed la samideanar' ŝin tuj regalas per aplaŭdo komprenema...

Plej aberacie prononcis Trezoro (Huang Yinbao), UEA-estrarano, kaj mi ne kapablis kompreni pli ol 50% de la enhavo de lia voĉlegata paroladeto, dum kiu plurfoje sonis la vorto *Esperendo*. Poste, kiam mi – iom honte – komentis al du spertuloj mian komprenon nur duonan, ili konfesis similan nekapablon propraorelan, kio evidente tranĉilvigis min...

Parenteze mi tamen devas konfesi, ke en posta aranĝo, la sama Trezoro, ne surpodie sed inter la publiko, stariĝis por spontane komenti ies intervenon, kaj ĉi-foje mi komprenis ĉirkaŭ 95% de lia diraĵo (kvankam li plu insistis pri *Esperendo*). Nu, verŝajne temas ne tiom pri lia prononco, kiom pri lia nekapablo voĉlegi kompreneble...

Mi menciis la paroladeton de la prezidantino de TEJO, Hoan Tran (Ĝojo). Sian iom akuzativ-avaran diraĵon ŝi elbuŝigis ne nur laŭtege, sed ankaŭ torente, eĉ mitrale, tiom galope, ke ŝia cerbo postiris la langon, kaj vokaloj forgesiĝis (*ti ĉi momento, Esprantujo*) aŭ konsonantiŝis (*alja mejlostono, alja rolo*). Feliĉe tion kontrastis la modela prononco de Otto Prytz [blindulo], kiu nelonge parolis nome de la Akademio.

Plej longe – kiel kutime, laŭdire – oratoris Mark Fettes, per sia leĝera akĉento angla kaj iom patosa stilo, sed lian preskaŭ tutan intervenon tradormis japana oldulino dekstre de mi, dum apudaj ĉinoj volupte fingrumis siajn telefonojn, tute ignorante la kanadanon. Kiam venis fino al lia latino, tondra aplaŭdo vekis la dormantaron, kiu tuj mem ekaplaŭdis entuziasme.

**Gonçalo Neves**  
(el *Reveno al Lisbono*, 2019)

## buntas pro Brazilo

Pavkoviĉ, tradukis Zlatoje Martinov), el Triesto (*Vivo de malkapablulo* de Italo Svevo, tradukis Carlo Minnaja).

La feminaj paĝoj atutas per artikolo de Perla Martinelli pri Greta Thunberg kaj vasta bildoriĉa recenzaro de Marie-France Conde Rey pri la ĵusa Internacia Festivalo de Femina Filmo, apud Parizo.

Librojn recenzas Carlo Minnaja (*Mesaĝo* de Fernando Pessoa, elportugaligis João José Santos) kaj Fernando Pita (*Bohemiaj lumoj* de R. Valle-Inclán, elhispanigis Miguel Fernández).

Tre baldaŭ atingonte la jubilean 300<sup>an</sup> numeron, *Literatura Foiro* estas ĉefredaktata de d-ino Perla Martinelli. Eldonas, posedas kaj administras LF-koop. Mendebila ĉe <lf-koop@esperantio.net>.

## Jam decidita la nova estraro de UEA

Laŭ la soveta procedo kiu karakterizas la elektojn en Universala E-Asocio, kun monata fruo estas jam divenebla la konsisto de la nova estraro de la Asocio mem.

La elekta komisiono je plimulto rekomendas: Duncan Charters, prezidanto; Fernando Pedrosa Maia jr kaj Huang Yinbao (Trezoro), vicprezidantoj; Aleks Kadar, ĝenerala sekretario; Orlando Raola, Jérémie Sabi-yumva, So Jinsu kaj Amri Wandel, estraranoj. Estas rimarkinde, ke nur unu el la ok loĝas en Eŭropo, kaj neniu el ili estas virino. Krome, rekandidatiĝas neniu el la elektitaj en 2016.

La Konsulo renkontis 19 jun 19 en Stokholmo diversajn aktivulojn, unuavice la legacian asistanton, Bertil Nilsson. Kun ili kaj kun la vickonsulo pri informado okazis konsultigo pri diversaj projektoj.

Interalie c-ano Nilsson okupiĝos pri la svedigo de la verko *Konciza kultura historio de la esperantlingva komunumo*. La eldono estos preparata kunlabore kun Esperanta PEN-Centro.

Alia temo estis la financado de eldono de la korespondaĵoj inter Stellan Engholm kaj Leen Deij. Pri la projekto promesis helpon funkciulo aktiva en la laborista E-movado, al kiu apartenis ambaŭ verkistoj.

Kun la direktoro de la biblioteko de Solidardomo, kie situas la norda legacio de la Esperanta Civito, estis difinita la procedo por la integriĝo de la socikultura libraro en Eo kaj aliaj lingvoj. Pri tiu libraro helpas ankaŭ stokholma E-istino.

## Unua ekskurso de geesperantistetoj



Okazis 8 jun 19 la unua ekskurso de infanoj kiuj lernas Eon kun c-ano Espoir Ngoma Kasati.

La foriro ekis matenhore per kvarvita karavano de Kasengo ĉe Herbart-lernejo (kie enestas nia E-klubo) ĝis la landlimo dogana de Kavimviro kun Katumbo. Tio estas la landlimo de Burundio kaj Kongolando, kie la infanoj vidis plaĉan pejzaĝon, renkontiĝis kun najbarlandanoj (Burundianoj), vidis hipopotamojn starante sur la

**Post Lahtio en Finnlando 2019, la Universala Kongreso okazos en Montrealo (Kanado) 2020, kaj en Belfasto (Norda Irlando) 2021.**

Se la elekta komisiono (Mandirola, Matte, Schroder, Weidmann) estus unuanima, la Komitato de UEA limiĝus je ratifo de la rekomendita listo. Pro la alternativo Charters/Pedrosa Maia restas almenaŭ unu demandosigno, kvankam pli formala ol substanco.

Teorie ankaŭ eblas, ke iu el la ok rekomenditoj ne estos elektita, se pli ol duono de la Komitato forstrekos lian nomon. **HeKo**

La Konsulo renkontis 19 jun 19 en Stokholmo diversajn aktivulojn, unuavice la legacian asistanton, Bertil Nilsson. Kun ili kaj kun la vickonsulo pri informado okazis konsultigo pri diversaj projektoj.

Interalie c-ano Nilsson okupiĝos pri la svedigo de la verko *Konciza kultura historio de la esperantlingva komunumo*. La eldono estos preparata kunlabore kun Esperanta PEN-Centro.

Alia temo estis la financado de eldono de la korespondaĵoj inter Stellan Engholm kaj Leen Deij. Pri la projekto promesis helpon funkciulo aktiva en la laborista E-movado, al kiu apartenis ambaŭ verkistoj.

Kun la direktoro de la biblioteko de Solidardomo, kie situas la norda legacio de la Esperanta Civito, estis difinita la procedo por la integriĝo de la socikultura libraro en Eo kaj aliaj lingvoj. Pri tiu libraro helpas ankaŭ stokholma E-istino.

ponto en unua rivero (Ruzizi) kaj plie ĝojis pro la evento kaj vizito al tiu longa kaj, je ilia aĝo, ne facila trafeblejo.

Post lernado kun dogana kanceliero kaj vizitado en diversaj doganaj oficejoj, la infanoj demandis pri la doganaĵoj. Sekvis paŭzo kaj pikniko, post kio estis tempo ludi skeĉojn kaj deklami poemojn en E-lingvo...

Je la kvara vespere aŭtoj ĉiam je dispono rehejmigis nin. **ENK**

## Donacis ĝis junio

Javier Alcalde 8,50. Pierre Berger 122,50. Jean Biollay 10,-. Sonja Brun 160,-. David Buhlmann 150,-. Claude Blanc 60,-. Anna Bürgy 30,-. Giuseppe Campolo 75,50. Tazio Carlevaro 30,-. Sylvie Colbois 50,-. Marie-France Conde Rey 180,-. Fran-çoise Cork 25,-. John-Arthur Cork 25,-. Andrée De Keuster-Nicolier 30,-. Esperanta Naturamikaro 360,-. Esperanta PEN-Centro 360,-. Feminisma Esperanta Movado 360,-. Yvette Fink Humbert 50,-. Pierre-Henri Glazmann 40,-. Bruno Graf 20,-. Georges Haldimann 25,-. Riichi Karibe 180,00. Stan Keable 115,-. Miroslava Kirova 217,-. Koooperativo de Literatura Foiro 360,-. Jean-Jacques Lavanchy 150,-. Franco Levi 23,-. Walter Magistrini 20,-. Perla Martinelli 180,-. Feri Mazlum 50,-. Carlo Minnaja 46,-. Bertil Nilsson 180,-. Hans Oertle 35,-. Eliane Purro Lavanchy 150,-. Nicolino Rossi 5,63. Giorgio Silfer 180,-. Noëlle Weyeneth 20,-. Maria Wenczel 30,-. Walter Želazny 180,- CHF

KORANDANKON!

